

Taskoj pri krea skribado

Tasko 1

Skribu la ciferojn 1-10 sur paperfolioj kaj metu ilin en ujo. Ĉiu persono (aŭ grupo) 4-foje elektas paperfolion por hazarde elekti 4 ciferojn. La kvar ciferojn vi uzu por elekti rolulon, lokon, tempon kaj situacion el la subaj tabeloj. Poste vi skribu mallongan rakonton kiu entenas la elektitajn elementojn.

Eble estas bona ideo se ĉiu persono en la grupo diras unu frazon :

- 1 diras frazon
- 2 diras frazon
- 3 diras frazon
- ...
- 1 diras frazon
- 2 diras frazon
- ... Ĝis ne restas pli da tempo

A –Rolulo:

1. Virino kiu ĵus fariĝis patrino
2. Fotisto
3. Junulo kiu ĵus finis la gimnazion
4. Posedanto de restoracio
5. Eksterterulo
6. Senhejma infano
7. 93-jara virino
8. Mediprotektanto
9. Studento ĉe la universitato
10. Muzikisto kiu ludas ĵazon

B - Loko:

1. Proksime de nacia parko
2. Ĉe geedziĝo
3. En neĝstormo
4. En multekosta restoracio
5. En vendeja centro
6. En urba parko
7. Ekster malnova bienula domo
8. Ĉe malpurigita rivero
9. Ĉe universitata biblioteko
10. En koncertejo

C- Tempo:

1. Dum arbara fajro
2. Post batalo (aŭ nur kverelo)
3. Nokto kiam okazas lerneja festo
4. Post granda manĝo
5. Iam en decembro
6. Meze en la nokto
7. Tuj post granda tondrostormo
8. Frue en la printempo
9. La unua semajno de la lerneja jaro
10. Dum koncerto

D- Situaco/defio

1. Necesas fari gravan decidon
2. Necesas konfesi sekreton al iu alia
3. Ies fiereco estas humiligita
4. Iu estas malgaja
5. Iu trovis aŭ perdis ion
6. Iu akuzis alian pro tio ke li faris ion malĝustan
7. Memorante kiel aferoj ŝanĝiĝis
8. Iu alia sentas ke li/ŝi volas cedi (ne plu eltenas la situacion)
9. Io embarasa ĵus okazis
10. Iu ĵus atingis gravan celon

Tasko 2

Mi elektis 13 vortojn hazarde el la vortaro. Skribu rakonton kiu entenas ĉiujn vortojn :

miopa

dento

donaci

pardoni

ŝultro

timi

internacia

averti

lito

nun

radiko

supozi

citrono